ADORU 102



2. *kunveno:*
   Venu, kolombo, Dia Spirito,
   tuŝu la akvon per Via bril'!
   Ni el ĉielo aŭdu la voĉon:
   «Jen mi vin amas, [ho mia fil' *aŭ:* mia filin'].»

3. *oficanto:*
   Ĉu vi deziras sekvi Jesuon,
   vivi laŭeble laŭ Lia vort',
   ami la homojn, porti la krucon,
   morti, kaj vivi spite al mort'?

4. *baptoto(j):*
   Jes, mi deziras sekvi Jesuon,
   klare Lin montri en mia mond',
   enpraktikigi Lian instruon,
   jesi Lin per tut-viva respond'.

5. *oficanto:*
   Do en la nom' de Dio, la Patro, *(baptante)*
   kaj en la nom' de Dio, la Fil',
   kaj en la nom' de l' Sankta Spirito
   mi nun vin baptas laŭ Dia gvid'.

6. *kunveno:*
   Ni vian bapton ĝoje atestas.
   Gloras ni Dion, unu en tri.
   Vian fratiĝon gaje ni festas.
   Vin bonvenigas la eklezi'.

AKVE MI BAPTOS VIN • M (Bunessan): antikva irlanda popola melodio antaŭ 1900, religie antaŭ 1933, konata ankaŭ sub la nomo Morning has broken, AK 1 • E (originale verkita): Leland Bryant Ross 1997*